

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 3 Eberswalde 1983- 01- 30

---

Ni povas ĝoje konstati, ke nia laboro pri la arbamastrumada fakvorto trezoro sukcese komencis. Kompreneble la komenco ne estas sen malfacilaĵoj, nekompletajoj kaj eraroj. Grava ekkono al la prilaboro de la unuaj dek slipoj estas la neceso, klare defini la nociojn. Ekzemple la nocio "abbrennen" (0002) povas esti transitiva kaj netransitiva. En 0002 estas opiniita la faktermino "bruligi la lignajn defalaĵon en forsto por neniigi" (mas).

Car la gvidlingvo de nia estonta vortaro estu E., la defino de nocio estu E-lingva. Sed nur E-lingva pro la kialo menciita en FI 2 kaj pro la necesaj laboro kaj papero por pluaj lingvoj. Por la prilaboro de la definoj oni necesas PIV. Tial ni proponas, ke la tri posedantoj de PIV, la s-anoj Marinov, Pachter kaj Svoboda bonvolu trakti la necesajn definojn. La definoj (koncizaj formuladoj) estos skribitaj en parentezoj post la E-lingva nocio. Ni diskutos la aferon okazedela kunveno en LEIPZIG (IFER- 83). S-ano Svoboda petis pripensi denove, ĉu 1000 aŭ 2000 ... 3000 nocioj estus elaktitaj, ĉar la afero daŭrigus 20 jaroja kondiĉe ke monate nur 10 nocioj estos prilaboritaj. Ni proponas, ke ankaŭ tiu ĉi problemo estu diskutata denove en Leipzig. S-ano Marinov petis decidi, ĉu estu elektitaj la verbon aŭ la substantivon (aŭ la du nociojn). Ni deiskutu en Leipzig. S-ano Marinov kritikis, ke sur la slipoj mankas la nocioj en serbokroata, slovena, makedonia kaj albana lingvoj. Nek ni havas analogajn vortarojn, nek anoncis sin E-forstistoj posedantaj tiujn lingvojn. Bedaŭrinde mankas ankaŭ kunlaborantoj de kelkaj aliaj gravaj lingvoj. Tuj kiam ni havos respektivajn kunlaborantojn, estas ebla, kompletigi la slipojn.

La vortaro de J. Weck enhavas mallongigojn por geografiaj teritorioj en rondaj parentesoj, por ke indiki la geografie limigitan uzadon de nocio. Ni uzos la sekvantajn mallongigojn:

Am	=	Ameriko
Ge	=	Germanio
La	=	Latinameriko

Se geografiaj teritorioj estas identaj kun ŝtatoj, ni uzos por la ŝtatoj la mallongigojn de internacia strata trafiko, ekz. E = Hispanio, BG = Bulgario. Konfuzo pro niaj internaj mallongigojn en la "Bibliografio de arbamastrumada literaturo" estas evitata, ĉar ties mallongigojn diam estas inter du oblikvaj strekoj. La kunlaborantoj certe rimarkis, ke sur la slipoj 0001.1 .. 0011 mankis preskaŭ ĉiuj "t". Estis defekto de la organizad-aŭtomato.

Estus faciligo por la laboro en Eberswalde, se korektaĵoj de eraroj sur la slipoj estus farita per ruĝa koloro.

Spertoj de aliaj grupoj, kiuj faras terminologian laboron, estas, ke oni devas kalkuli kum perdoj dum la poŝta vojo. Por ke rapide ekkoni perdojn, ni aldonos al ĉiu slipo-sendaĵo liston pri la senditaj kaj ricavitaj slipoj. Ĉiu kunlaboranto povas mem provi, ĉu li ricevis ĉiujn sendaĵojn kaj ni ricevis liajn sendaĵojn.

Ni proponas, ke la kunlaborantoj resendu, se eble, la slipoj dum kvar semajnoj.

La poŝtafranko eble povas malgrandiĝi per signado de slipo- sendaĵo kiel presaĵo.

Kompletigante la liston de kunlaborantoj en FI 2, ni donas la sekvantajn adresojn:

BERGER, Otto, CS- 547 01 NÁCHOD, Montace 1443

MOUDRÝ, Jindrich, CS- 679 02 RÁJEC- JESTŘEBÍ, Lesnická 215

K.-H. Simon

Kelkaj pensoj pri nia terminologia laboro

Ingwart Ullrich

Karaj gekolegoj !

Jam en la komenco de nia granda tasko, traduki forstajn terminojn en Esperanton, montriĝas, ke tiu ĉi tasko estos ne facila, sed komplika, peniga kaj longedaŭra. Mia sekvantaj eksplikoj celas plifaciligon de nia laboro, kiun mi ĝis nun taskas bona, Mi ne intencas fari longan antaŭparolon, sed deziras tuj iri "en medias res"

Laŭ mi necesas nepre indiki signifodiferencojn (klarigajn aldonaĵojn) de plursencaj terminoj. Tial mi povas ne tute malakoepti la proponon de nia kolego Marinov, nome kompletigi la slipojn per teksto, klariganta la terminojn. Nur, laŭ mi, ne ĉiuj terminoj bezonas klarigon, sed nur tiuj, kiuj estas evidende plursencaj kaj pro tio nepre bezonas klarigajn aldonaĵojn por povi traduki ilin adekvata, lam eldonota forsta vortaro devas enhavi klarigajn aldonaĵojn necesajn resp, indikojn pri signifodiferencoj de plursencaj terminoj, same kiel oni trovas en ĉiu ĝenerala vortaro klarigajn aldonaĵojn !

Signifodiferencoj ekz, evidentiĝas ĉe la termino 0002 "abbrennen". Tiu ĉi termino enhavas tri ideojn (signifodiferencoj):

- (1) parolante pri io, kio "estas forbrulanta", kio "forbrulas", do pri netransitiva ago "forbruli", ekz.: "Densejo de kvin haktaroj forbrulis, "
- (2) parolante pri ekz. branĉaro ktp. , kium oni volas "igi forbrulanta", do "bruligi" (konsumigi de fajro);
- (3) parolante pri vegetaĵara kovraĵo, kiun oni volas forigi per fajro, do "forbruligi".

La signifodiferencoj (2) kaj (3) entenas ideojn de transitivaj agoj. Do, estus malkorekte, uzi (1) por (2) kaj (3) kaj inverse. Se oni ne indikas signifodiferencojn, estas ne klare, ĉu oni volas esprimi per la tradukita termino nur la koncernan laŭ ĝia lingva korekto validan ideon aŭ ĉiujn tri ideojn. Por eviti miskomprenojn oni devas indiki ĉiujn eventuale eblajn ideojn (signifodiferencojn) kun ilia adekvata (lingve kaj logike korekta) traduko. Mi mem tradukis la ĉi-supran terminon "abbrennen" nur per "forbruligi", ĉar mi nur la trian signifon taksis faktermino kaj la du aliajn ("forbruli" kaj "bruligi") ĝenerala. Do aperas ankoraŭ alia demando, nome ĉu oni traduku principe nur la fakterminan signifon kaj aliajn forlasu?

Konkludante, mi proponas la sekvan:

Por eviti miskomprenojn kaj gardi la lingvan kvaliton oni indiku signifodiferencoj ĉe tute evidente plursencaj terminoj tiunmaniere, ke oni indiku la signifodiferencojn inter rondaj parentezoj antaŭ la termino. Plue necesas signi la verbojn, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj, aŭ kaj transitivaj kaj netransitivaj. Sed sufiĉas signi nur la netransitivajn verbojn. Ĉiuj aliaj, ne signitaj, povas esti nur transitivaj resp. kaj transitivaj kaj netransitivaj. Ankaŭ ne necesas signi la iĝ-verbojn, ĉar ili ja povas esti nur netransitivaj. La indikon oni metu malantaŭ la terminon. Do, en la kazo de la ĉi-supra termino 0002 "abbrennen" oni skribi sur la slipon:

0002  
ge: abbrennen

Es: forbruli ntr; (pp branĉaro ktp) bruligi; (pp vegeta ĵara kovra ĵo) forbruligi (mallingigoj: pp = parolante pri; ntr = netransitiva) Se eblas pluraj adekvataj tradukoj sub iu signifodiferenco, oni metu la preferatan unulokan malantaŭe de la koncerna signifodiferenco.

Mi volas ankoraŭfoje akcenti ne troigi la aplikon de indikoj pri signifodiferencoj, sed oni faru nur indikojn, sa tio nepre necesas. Sa ni tiusence aplikas indiojn pri signifodiferencoj, tian tio ne tro forte superos nian potencon. La kvalito de nia laboro ne dependu de tio, kion ni povas fari aŭ ne fari, sed ĝi ordonas, kion ni devas fari.

Ni esecence konsentas al la ideoj en la artikolo de I. Ullrich. Ne ĉiuj nocioj necesas definon. Rilate al la indiko de signifodiferencoj ni devas preferi la parentezojn ĉiam malantaŭ la nocio,

ekz. forbruligi (la vegetaĵaran kovraĵon). La pli malfrua alfabeto ordigado de vortoj estos farata per komputero laŭ la literoj post la dupunkto kaj komo. Tiel ankaŭ ni ne bezonas la mallongigon "pp" .

K.-H. S.

Listo pri senditaj kaj ricevitaĵoj

	send.	ricev.	send.	ricev.
Barasevich	01.1 ..11			
Berger	01.1 ..11			
Glajcar	01 ..02			
Hinz	01.1 ..11	01.1 ..11		
Hjorth	01 ..02		01.1 ..11	
Järvsalu	01 ..02			
Kovaleva	01 ..02			
Marinov	01.1 ..11	01.1 ..11		
Maserov	01.1 ..11	01.1 ..11		
Moudrý	01.1 ..11	01.1 ..11		
Oroszi	01.1 ..11	01.1 ..11		
Pachter	01.1 ..11	01.1 ..11		
Reiser	01 ..02			
Sigurdsson	01 ..02			
Sulżycki	01 ..02		01.1 ..11	
Svoboda	01.1 ..11	01.1 ..11		
Ullrich	01.1 ..11	01.1 ..11		
Váňa	01 ..02			